

Internacia Festivalo

27 decembro – 3 januaro

• via jarfina aranĝo •

(kun plilongiga ebleco ĝis 4 januaro)

Internacia

Kantaro

3-a eldono 2008 • parta represo

INTERNACIA FESTIVALO

www.internacia-festivalo.de

... jarfine al IF

VIVU LA STEL' (<i>originale verkita</i>)	3
LA LINGVO POR NI (<i>originale verkita</i>)	4
IF-TRINKKANTO (<i>originale verkita</i>)	6
LA IF-HIMNO (<i>originale verkita</i>)	8
LIBERA LA PENS' (<i>germana</i>)	9
MARIŜA, KISU MIN! (<i>slovaka</i>)	10
'SUR LE PONT' (<i>franca</i>)	11
GUANTANAMERA (<i>hispana</i>)	12
ISRAELAJ MELODIOJ (<i>israela</i>)	14
KLEMENTIN' (<i>usona</i>)	16
KATJUŜKA (<i>rusa</i>)	18
KNABINETO (<i>pola</i>)	19
ĈUMI DO (<i>germana</i>)	20
DONA DONA (<i>jida</i>)	22
SANKTA LUCIA (<i>itala</i>)	24
ĈIUJ FLOROJ (<i>angla</i>)	26
LA KNABINO DE HAVANO (<i>sveda</i>)	27
LORELEJ' (<i>germana</i>)	28
EI GRIZAJ URBAJ MUROJ (<i>germana</i>)	30
BALTAMARAJ ONDOJ (<i>germana</i>)	31
AMATA LANDO (<i>originale verkita</i>)	32
APUDMOSKVAJ VESPEROJ (<i>rusa</i>)	34
FIŜIST-FILINO (<i>kroata</i>)	35
FINNA PAŜTISTINO (<i>finna</i>)	36
BLANKAJ CIGNOJ (<i>kozaka</i>)	37
MORITATO DE LA VERDA ĈAPO (<i>itala</i>)	38
JEN DANKO MIA (<i>kroata</i>)	40

Kolektis la kantojn:

Maria Beloŝević, Kroatio

Mikaelo Bronŝtejn, Rusio

Wolfram Diestel, Germanio

Liba Gabalda, Francio

Albrecht Kronenberger, Germanio

Sylvia Lassika, Germanio

Gunnar Olsson, Svedio

Redaktis kaj enpaĝigis:

Hans-Dieter Platz

Muziknotojn aranĝis:

Albrecht Kronenberger

Korektlegis:

Nora Caragea

•
kantu
kaj
amuziĝu
en
gaja
rondo
•



desegnaĵoj:

Carl Larsson (1853 - 1919), Svedio

... cetere, dum via venonta vizito en Svedio nepre vizitu la etan paradizon de Larsson ("Carl-Larsson-Gården") en Sundborn (apud Falun, 230 km nordokcidente de Stockholm).

VIVU LA STEL'

Gaje

1. Ple - ni - gu la gla-son, ho ĉi - u bo-nul'.
Kaj kan-tu la ho-moj el ĉi - u an-gul'.

The first system shows a treble clef, 2/4 time signature, and a key signature of one flat. The melody consists of quarter notes and eighth notes, with three triplet markings over the first, second, and third measures. The lyrics are: 1. Ple - ni - gu la gla-son, ho ĉi - u bo-nul'. Kaj kan-tu la ho-moj el ĉi - u an-gul'.

1.-3. Vi - vu la ver - da stel'!

Refreno:

Ho, vi - vu la, vi - vu la, vi - vu la stel',
vi - vu la, vi - vu la, vi - vu la stel', vi - vu la stel',
vi - vu la stel', vi - vu la ver - da stel'!

The chorus consists of three lines of music. The first line has lyrics: Ho, vi - vu la, vi - vu la, vi - vu la stel'. The second line has lyrics: vi - vu la, vi - vu la, vi - vu la stel', vi - vu la stel'. The third line has lyrics: vi - vu la stel', vi - vu la ver - da stel'!. Each line features triplet markings over the first three notes.

2. Plenigu la glason kaj tostu kun ni,
vivu la verda stel'!
la lingvon kreitan por ĉiu naci'.
Vivu la verda stel'!
Ho, vivu ...

3. Per voĉoj de nia kunbatalantar',
vivu la verda stel'!
resonu la voko sur tero kaj mar',
vivu la verda stel'!
Ho, vivu ...

E (originale verkita): Agnes B. Deans


LA LINGVO POR NI



1. Sur mon-toj kaj step' in - di - a - noj —



ĉa - sa - das kun ruĝ - fa - mi - li', —



kaj se vi pos - tu - las pa - ro - lon, —



kan - jo - ne e - ĥi - ĝas la kri': —


Refreno:



Es - pe - ran - to es - tas la lin - gvo por ni, por ni.



Es - pe - ran - to es - tas la lin - gvo por ni. —



▲ LA LINGVO POR NI

2. En densa afrika ĝangalo
nigruloj sen teknologi'
jam solvis la lingvan problemon
tamtame resonas la kri': Esperanto ...
3. Ĉe norda poluso eskimoj
loĝadas en neĝ' kaj glaci',
Se ili bezonas parolon,
aŭdiĝas tutsame la kri': Esperanto ...
4. Sur tuta la vasta terĝlobo,
en urboj de ĉiu naci',
troviĝas samideanaro,
kaj sonas de buboj la kri': Esperanto ...
5. Indianoj, nigruloj, eskimoj,
urbanoj kaj buboj kaj mi
jam uzas la Zamenhof-lingvon.
Do vivu, prosperu la kri': Esperanto ...

M: "My Bonnie is over the ocean"
E (originale verkita): F. Douglas Murphy



IF-TRINKKANTO

Strofoj:



1. Jen Krist - nas-ko de - no-ve Nin a - tin-gis bon -
tro - ve, Do post hej - ma ku - ti - ma fes -
tad' Ni vo - ja-ĝon re - a-mas, Ni-a ce-lo nun
sa-mas: I - ru ni al I - Fo, ka - ma - rad'!

► *Refreno: vd. sekvantan paĝon* ▼

2. En la mez' de Eŭropo
Nin akceptas HDP -
Kun sincera gastamo, kaj do -
Ni salutu lin, kaj po
Bierkruĉo en Knajpo
Levu ĉiu je nia IF.

Refreno ▼ ...

3. Inter brilaj abioj,
Ardaj tostoj, ĝojkrioj
Certe estas aŭdeblaj en for'.
Kaj sendube eĉ NIFOj
Volus veni al IFoj,
Se trakosme penetrus inform'.

Refreno ▼ ...

▲ IF-TRINKKANTO (refreno)

Refreno:




Hej, hej - le - vu la gla - son!
Hej, hej - kur' ka - len - da - ra,



Hej, hej - kap - tu l' o - ka - zon
Hej, hej - soj - lo nov - ja - ra



Nur bon - in - kli - ne tos - ti jar - fi - ne
Ĉi - ujn nin li - gis kaj kun - ve - ni - gis




En la a - mi - ka me - di!



Fes - to kaj lin - gvo por ni.

E (originale verkita): Mikaelo Bronŝtejn
Rusio, 2007



LA IF-HIMNO

1. Mal-ĝo-je la ho-moj ri-gar-dis.. for-pa-si
La ko-roj pre-mi-te nur po-vis-be-daŭ-ri
la tem-pon kaj tre-ni ju-ne-con jam for-
fa-ta-lan for-i-ron de l' a-ĝo el or.
Sed daŭ-ran ju-ne-con pro-po-nis pro-vi-zi
ju-nu-lo ti-a-ma nun a-ĝa jam tro:
ku-ra-ĝe sin-do-ne eb-li-gis plu-vi-von
per ĉi fes-ti-va-lo al ni Ho-Do-Po.

2. Ne nur la gepatroj sed ankaŭ infanoj
alkuras kontente al klera festen'.
Prelege aŭ knajpe la lingvon ekzercas,
jen saŭnas, jen naĝas en taŭga basen'.
Kun ĝojo ni ĉiuj solene konstatas,
ke brile sukcesis la nuna IF.
Ni volas daŭrigon, venontan atendas,
sopiras je venko kaj glori, ko-to-po.

laŭ kimra popolokanto
"The Ashe Grove"

E (originale verkita): Giulio Cappa,
Anton Oberndorfer, Yashovardhan,
Helen Fantom (10-a IF, 2 jan 1994)

LIBERA LA PENS'

1. La pen-so de la hom' li - be-ra ja es-tas,
sam - ki-el fan - tom' ka - ŝi-ta ĝi res-tas.
Ĝin hom' ne di - ve-nos nek ĉir-kaŭ-ka - te-nos,
do, res-tas laŭ — senc': ke li - be - ra la pens'!

2. Mi pensas laŭ plezur', nenie ĝin citas,
sekrete mi nur pri ĉio meditas.
Dezirojn - vi sciu, malhelpas neniuj,
do restu laŭ senc': ke libera la pens'!
3. Se iam kaptos min karcero malhela,
deklaros mi ĝin agado sencela:
La pensoj trapasos, la murojn frakasos
per granda potenc', ĉar libera la pens'!
4. Do tial nun ĉe fin' mi zorgojn forpelas;
turmentas ili min, viv-ĝojon forŝtelas!
Mi povas sentime ĝojadi anime
kaj pensi de komenc': Ja libera la pens'!

germana popolkanto
el la 18-a jarcento
E: B. Klatil

MARIŠA, KISU MIN!

Vigle



1. Ći-uj kna-boj kaj kna-bi-noj a-mas sin,



nur ne-ni-u ju-nu-le-to a-mas min.

Refreno:



Ma-ri-ša, ki-su min,— sen pe-to al pa-trin',—



— ŝi ju-na sa-me fa-ris, pri ki-soj ne a-va-ris.

2. Batas panjo, batas panjo, batas min,
ke mi amas, ke mi kisas, knabon, vin.
Mariša, kisu min ...
3. Sidas panjo, sidas panjo sur kortet',
kaj mi estas en kamero kun knabet'.
Mariša, kisu min ...


slovaka popolkanto
E: Ladislav Kysely



SUR LE PONT D'AVIGNON



Refreno: *Sur le pont d'A-vi-gnon o-ni dan-cas, o-ni dan-cas.*



Sur le pont d'A-vi-gnon o-ni dan-cas en la rond'.




1. Ti-el fa-ras la ju-nul', es-tas ve-re li ĉar-mul';
la fraŭ-lin' a-do-ras lin, ne plu po-vas re-gi sin.

2. La avinjo sur la pont' ankaŭ dancas en la rond';
kaj la fiŝoj sub la pont' dancas same en la rond'.

3. Tiel faras la soldat' kaj salutas ĉe l' parad';
hundoj, katoj, eĉ azen' estas ankaŭ ĉe l' aren'.

M kaj T: laŭ franca kanto
E: tradukinto ne konata



GUANTANAMERA

Refreno:



Guan-ta - na - me - ra, —

gua-ji - ra



guan-ta-na - me-ra, —

Guan-ta-na - me-



ra,

gua-ji - ra

guan-ta - na - me - ra.

Strofoj:



1. De ki - e kres-kas la pal-moj — mi ve-nas,



ho - mo sin - ce-ra,

de ki-e kres-kas la



pal - moj — mi ve - nas, ho - mo sin -



ce - ra, —

por kan-ti sim-plajn kor -



kan - tojn — al ni-a mon-do mi - ze - ra. —

▲ GUANTANAMERA

2. |: La kantoj spiras helverdon
kaj spiras ardan brulruĝon :|
kaj kiel cervo vundita
en montoj serĉas rifuĝon.

refreno: Guantanamera ...

3. |: Mi disdividas la sorton
kun la mizera homaro, :|
ĉar tiu monta torento
ĝojigas min pli ol maro.

refreno: Guantanamera ...

M: Joseíto Fernandez
kuba T: José Martí
E: tradukinto ne konata

post 1959 kanto de la kuba revolucio
transprenita de Pete Seeger, Joan Baez kaj aliaj,
en Eŭropo merkatadita de la distra industrio

guajira Guantanamera = kamparanino el Guantánamo
en la kanto: 'Gu' prononcu kiel 'gv'
(en la hispana: u post g = konsonanta
prononco kiel angla w)



ISRAELAJ MELODIOJ

1. Is - ra - e - laj me - lo - di - oj
tu - ŝas mi - an ko - ron.
Mo - laj, var - maj har - mo - ni - oj
ve - kas re - me - mo - ron.


Refreno:

Ve - nu, ka - raj ge - a - mi - koj,
aù - du mi - an kan - ton.
Ne for - ge - su Is - ra - e - lon,
vi - an be - lan lan - don.

▲ ISRAELAJ KANTOJ

2. Fluas lakto kaj mielo,
floras kamp-lilioj,
flugas birdoj sub ĉielo,
flirtas papilioj.
3. Jen Jordana ebenaĵo,
Samariaj montoj,
Juda suda dezertaĵo,
Galileaj fontoj.
4. Kiom homoj ĉi suferis
pro ilia tero!
Ĉiam ili sin superis,
restis en espero.
5. Via lando mult-facia,
ĝia historio,
sin spegulas en gracia
mola melodio.

M: Israela popolkanto
E (originale verkita): Albrecht Kronenberger
1990/2008



KLEMENTIN'



1. En ka-ver-no en kan-jo-no, la-bo-ran-te je la min',



ve-ra mas-tro es-tis pa-tro de fi-li-no Kle-men-tin'.



Ve-ra mas-tro— es-tis pa-tro— de fi-li-no— Kle-men-tin'.

Refreno:




Mi-a ka-ra, mi-a ka-ra, mi-a ka-ra Kle-men-tin',



vi per-di-ğis por çî-a-me, be-daũ-rin-de, Kle-men-tin'!



Vi per-di-ğis— por çî-a-me,— be-daũ-rin-de,— Klementin'!



▲ KLEMENTIN'

2. Elefante tre gracia,
delikata pezulin',
pakaĵkesto – taŭga vesto
por pied' de Klementin',
pakaĵkesto – taŭga vesto
por pied' de Klementin'.
3. Anasidojn al la akvo
ŝi kondukis laŭ rutin' –
falis glite kaj subite
subakviĝis Klementin',
falis glite kaj subite
subakviĝis Klementin'.
4. La veziko el la buŝo
bobelsone tiris sin,
mi kuraĝis, sed ne naĝis –
tiel dronis Klementin'!
Mi kuraĝis, sed ne naĝis –
tiel dronis Klementin'!



usona popolkanto
E: H. W. Holmes

KATJUŜKA


1. Jam prin-tem - po blo-vas tra la ar-boj.
No - va vi - vo ve - nas el la ter'.
Tra la kam-poj.. ve - nas jen Kat-juŝ - ka
laŭ la ga - ja flu - o de l' ri - ver'.

2. Jen Katjuŝka kantas mildan kanton,
kun malĝojo rememoras ŝi:
|: Iam al ŝi kantis ĝin amato,
kiu estas malproksime nun. :|
3. Ho Katjuŝka, ridu al la vivo,
belaj tagoj ja atendas vin:
|: La amato baldaŭ ja revenos,
en vilaĝa festo dancos vi. :|

rusa popolkanto
E: E. Davido

KNABINETO

Ritmo de valsó



1. Kna-bi - ne-to ar-ba - re-ton tur-nis sin kun
2. Ĉa-sis - te-to, sam-vo - ja-no, mi sa - lu - tas

ĝoj', a, — tur-nis sin kun ĝoj', a, — tur-nis
vin, a, — mi sa - lu - tas vin, a, — mi sa -

sin kun ĝoj', — kaj ren - kon - tis ĉa-sis - te - ton
lu - tas vin. — Vi ri - ce - vus bu-ter - pa-non,

sur la sa - ma voj', a, — sur la sa - ma
sed mi man-ĝis ĝin, a, — sed mi man-ĝis

voj', a, — sur la sa - ma voj'. —
ĝin, a, — sed mi man-ĝis ĝin. —

Refreno:



La-la - la, la-la - la, la-la-la - la. La-la - la,
la-la - la, la-la-la - la. La-la - la, la-la - la,
la-la-la - la. La-la-la, la-la-la, la-la-la - la.

laŭ pola kanto
E: Roman Dobrzyński

ÊU MI DO, ÊU MI DO



1. Êu mi do, êu mi do de-vas mi-gri— for,
Sed re - ve-nos, re-ve-nos mi, ve-nos— ja,



mi-gri— for, kaj vin so-la la-sos mi?
ve-nos— ja, por gas - ta-di nur êe vi!



Mi ne daŭ - re po - vas res - ti jen,




sed pro vi nur ĝo - jas — mi:



Mi re - ve-nos, re - ve-nos mi, ve-nos— ja,



ve-nos— ja, por gas - ta-di nur êe vi.



▲ ĈU MI DO, ĈU MI DO

2. Jen vi ploras, vi ploras, ĉar iras mi for, iras mi for,
kvazaŭ vin ne amus mi!

Kvankam ridos al mi iu bela knabin', bela knabin',
mi do estus nur por vi!

Kredu, ke fidelon ĵuris, ne ĝin forgesos mia kor'.

Kvankam ridos al mi iu bela knabin', bela knabin',
mi do estus nur por vi!


3. Unu jar', unu jar' nur pasos, ja, pasos, ja,
tiam mi revenos vin!

Se vi min, se vi min daŭre amos, jen, amos, jen,
estos mia vi edzin'!

Ja post unu jar' revenos mi, mia kor' sopiras vin!

Se vi min, se vi min, daŭre amos, jen, amos, jen,
estos mia vi edzin'!

germana (ŝvaba) popolkanto
"Muss i denn zum Städtele hinaus"
E: Ludwig Emil Meier



DONA DONA



1. Jen sur ĉa - ro al fo - i - ro
Su - pre flu - gas kun ze - fi - ro



tris - te sta - ras bo - vid' en plor'.
la hi - run - do en dan - da sor'.

Refreno:



Sed la ven - toj ri - das, ri - das kun fi - er',



ta - gon kaj ves - pe - ron plu tra prin - tem - po kaj so - mer'.



Do - na, do - na, do - na, do - na, Do - na, do - na, do - na, don.



Do - na, do - na, do - na, do - na, Do - na, do - na, do - na, don.





DONA DONA

2. «Ĉesu plendi!» diras viro,
«ĉar bovido naskiĝis vi.
Al bestaĉo senflugila
decas rampi sen plenda kri'.»

Refreno

3. La bovidoj sen espero
iras vice al la buĉej'.
Sed ja ĉiuj al libero
de l' hirundo sopiras plej.

Refreno

jida kanto
M: laŭ Shalom Sekunda
T: Aaron Tsajtlin
E: T. Schwarz



SANKTA LUCIA



1. Su-per mar' bri - las lu-na ar - ĝen-to,




dol - ĉe blo - ve - tas ze - fi - ra ven - to.



Ve-nu ra - pi - de al bar-ko mi - a.



Sank - ta - Lu - ci - a, Sank-ta Lu - ci-a.



▲ SANKTA LUCIA

2. Bone vi fartos en la barketo.
Ravas agrabla, milda venteto,
| : logas al revoj sur mar' magia.
Sankta Lucia, Sankta Lucia. : |


3. Ne restu hejme, venu por esti
sur mia barko, ĝui kaj festi.
| : Vin akompanas rido la dia.
Sankta Lucia, Sankta Lucia. : |

4. Sur mia barko en ŝirma tendo
vin ja atentos nokta silento.
| : Pasos sekure dormo la via.
Sankta Lucia, Sankta Lucia. : |

5. Napolo ĉarma, ter' sen ĉagreno,
ĉiam alridas vin dia beno.
| : Vi estas lando plenharmunia.
Sankta Lucia, Sankta Lucia. : |

6. Kial heziti? Bela vespero!
Freŝa, varmeta jen la aero.
| : Venu nun, venu al barko mia.
Sankta Lucia, Sankta Lucia. : |

itala popolkanto
E: Joachim Giessner
(el: *Mia Kantaro I*)




ĈIUJ FLOROJ

1. Ĉi-uj flo - roj es-tas for.— Ki-e i - li
 es-tas nun? Ĉi-uj flo - roj es-tas for.—
 Jam de lon-ga temp'. Ĉi-uj flo - roj
 es - tas for.— Kna-bin' i - lin pre - mis
 al la kor'.— Ĉu nun kom - pre-nas vi?—
 Ĉu nun kom - pre-nas vi?

2. Ĉiuj knabinoj estas for ... edziniĝis post ador'.
3. Ĉiuj edzoj estas for ... soldatiĝis kun dolor'.
4. Ĉiuj soldatoj estas for ... en la tomboj de l' memor'.
5. Ĉiuj tomboj estas for ... kovras ilin flor-trezor'.

angla
 "Where have all the flowers gone"
 M kaj T: Pete Seeger
 E: Wouter Pilger

LA KNABINO DE HAVANO



1. Ju-nu-lin' ha - va - na si - das al-te sur al-tan',



vi - ron ŝi ek - vi - das, sig - nas per la man'.



«Ve-nu tuj, ma - ris-ta hom', min vi-zi-tu en la dom'!



Ju - na vi kaj be - la mi! Kan - tu ko - re vi!»

2. Junulin' havana fermas pordon. Jen la du!
Havas jam la viro ŝin sur la genu'.
«Estu mia reĝo tuj! Donu monon al monuj!»
Juna vi, bela mi! Kantu kore vi!»
3. Junulin' havana nun aŭskultas al la vir':
«Mono ne, sed tio estas por akir'.»
Kaj rubenan ringon tuj prenas li el la monuj',
«Juna, bela estas vi. Kantu kore vi!»
4. Junulin' havana – sune brilas la okul' –
ringon la rubenan prenas de l' junul'.
«Funtojn kostas ĝi dekkvin.» «Bone! Ne forlasu min!
Juna vi, kaj bela mi! Kantu kore ni!»
5. Junulin' havana sidas alte sur altan',
viron ŝi ekvidas, signas per la man'.
Ĝin ornamas bela ring', bruston ĉarma krep-de-ĉin'.
Juna vi, kaj bela mi! Kantu kore ni!

sveda
"Flickan i Havanna"
M kaj T: Evert Taube

LORELEJ'

1. Ne sci - as mi, ki - al mi es - tas
Mal - ga - ja en — la kor', —
An - tik - va fa - be - lo res - tas
Por êi - am en mi - a me - mor', —
Ves - pe - ro jam ek - mal - he - li - gas,
Flu - a - das la Rejn' en tran - kvil', —
La su - pro de l' mon - to lu - mi - gas
En ves - per - su - na bril'. —

▲ LORELEJ'

2. Belega knabino jen tronas
kun ora juvelar',
la belan vizaĝon kronas
mirinde la ora harar'.
Ŝi uzas la oran kombilon
kaj dume kantas ŝi,
sed havas strangan stilon
sorĉigan la melodi'.

3. Kaj sopiregon eksentas
ŝipisto ĉe sia vetur';
rifaron li ne priatentas,
rigardas ja alten li nur.
Mi kredas, ke dronos do fine
ŝipisto kun sia boat',
kaj tion kaŭzis feine
la Loreleja kantad'.



germana
"Ich weiss nicht..."
M: Friedrich Silcher
T: Heinrich Heine
E: Leopold Elb
(el "Junularo kantas")

EL GRIZAJ URBAJ MUROJ

1. El gri - zaj ur - baj mū - roj
Fi - lis - troj pu - tru hej - me,
ad - mo - nas va - ga - bond':
ni mi - gras tra la mond'.
Refreno:
Ha - li', ha - lo', ni mi - gras,
ni mi - gras tra la mond'.

The musical score is written in G major (one sharp) and 4/4 time. It consists of two systems of music. The first system has three measures with chords E, A, and E. The second system has two measures with chords B7 and F. The lyrics are in Esperanto and describe the plight of the poor in a grey city.

2. Ni amas vin, arbaro,
ho, kara dia fond';
ĉu pluas aŭ serenas –
ni migras tra la mond' ...
3. Ekvivu roka turo,
ekvivu akva ond',
laŭtsonas tra l'naturō:
ni migras tra la mond' ...
4. La birdoj preterflugas
sub la ĉiela rond';
signifas adiaŭi,
ni migras tra la mond' ...

germana
"Aus grauen Städten Mauern"
M: Robert Götz
T: Hans Riedel (1-3)
Hermann Löns (4)
E: Josef Kühnel

BALTAMARAJ ONDOJ

Balance C G⁷

1. Bal-ta - ma-raj on-doj bru-as ê la bord',—

G C

be-le kres-kas fla-ve la ge - nis-ta flor'.—

C C G F/G G⁷

Ki-e me-voj kri-êas kun la ŝtor-ma kant',

C G⁷ 1. C 2. C

ti-e êi-am es-tas mi-a hej-ma land'.— land'.—

2. Onda muĝo estis mia lula kant',
 miajn junajn jarojn vidis duna strand'.
 | : Arde mi sopiris vagi tra la mond',
 tra la foraj landoj kaj sur mara ond'. : |

3. Do nun mi sukcesis tramigradi ĝin,
 ĉio malaperis, kio pelis min.
 | : Estas plenumita mia kordezir',
 trovis mi trankvilon, restis la sopir'. : |

4. Ege mi sopiras al insula land',
 kie ondoj bruas ê la blanka strand'.
 | : Kie mevoj kriêas kun la ŝtorma kant',
 tie sole estas mia hejma land'. : |

germana
 "Wo die Nordseewellen..."
 M: Simon Krannig
 T: Martha Müller-Grählert
 E: Manfred Goldenbogen

AMATA LANDO



1. I - e sur te - ro ek - so - nos la kant'



en la lin - gvo plej ka - ra por mi. —



I - e a - pe - ros sur te - ro la land',



tu - tan ja - ron mi re - vis pri ĝi. —

Refreno:



I - ras al vi, — a - ma - ta land', —



ku - ras al vi, — a - ma - ta land', —



nu - re al vi, — a - ma - ta land', —



ni - a ten - dar' — - a - ma - ta land'! —



AMATA LANDO

2. Tie en tendoj sub verda tegment'
loĝas gaja, bonkora popol'.
Tie atendas labora torent',
festa ĝojo, tenera konsol'.
3. Bluan vesperon karesas la flam',
sonas voĉoj kaj dancas fajrer'.
Se en ĉi-lando vi revos pri am',
amo venos, plej bona sur ter'.
4. Venos de l' fajro sopira rebril',
diros ni: Ĝis revido, tendar',
ĉiuj poretos, kaj eĉ krokodil'
ĵuros lingvon ellerni dum jar'.

kanto de Mikaelo Bronŝtejn



APUDMOSKVAJ VESPEROJ

1. Ne aŭ-di-ĝas eĉ flus-tro en obs - kur',
 ĉi - o dor-mas nun ti - e ĉi. Ki - el
 ŝa - tas ja, se vi sci - us nur, a - pud -
 mos-kvajn ves - pe-rojn mi. ...pe-rojn ni.

2. Iom plaŭdas flu' kaj ne plaŭdas plu,
 plenas de arĝent' la river'.
 |: Kanton aŭdas mi kaj ne aŭdas plu,
 en mallaŭto de la vesper'. :|
3. Kial, kara, vi kapon klinas pli
 kaj rigardas nun ruze min?
 |: Ĉu esprimas mi, ne esprimas mi,
 Kio ardas en la anim' ... :|
4. Kaj alvenas jam la matena hor',
 brilas ruĝa jam lum-lini' ...
 |: Tenu en memor', tenu en la kor'
 apudmoskvajn vesperojn ni. :|

rusa
 "Подмосковные вечера"
 M: V. Solovjev-Sedoj
 T: M. Matusovskij
 E: K. Gusev

FIŜIST-FILINO

1. En re - gi - o - no de cent mej - loj,
 plej be - la, ĉar - ma kna - bin'
 es - tas ko - na - ta, ju - na Jan - jo,
 de la fi - ŝist' fi - lin'.
 de la fi - ŝist' fi - lin'.

2. Vinbere dolĉas ŝiaj lipoj,
 kiel abio la svel't',
 |: de fiŝo klaraj la okuloj,
 de najtingal' talent'. :|
3. El urbo kapti fiŝojn venis
 bela kaj ĉarma junul'.
 |: En amo li ŝin havis, lasis.
 Ho Janjo, kio nun? :|
4. Kiam fiŝisto reton tiris,
 kaptis ne fiŝon li.
 |: En reto morta Janjo kuŝis,
 de la fiŝist' filin'. :|

kroata popolokanto
 "Ribara ŝtrog kći"
 tradukinto ne konata

FINNA PAŜTISTINO

1. Mi nur es - tas e - ta paŝ - tis - ti - do,
e - ta fin - na paŝ - tis - ti - do.
1.-4. Hej, ko - re kan - ti, ko - re kan - ti
tu - te sen - zor - ge!—
1. E - ta fin - na paŝ - tis - ti - do.


2. Mi al mi tranĉile faras fluton,
helan, belan, ŝalman fluton.
3. Mi elkore flutos melodion,
ĉarman, dolĉan melodion.
4. Mi muzikos nur por miaj ŝafoj,
nur por miaj blankaj ŝafoj.

el Finnlando
E: Albrecht Kronenberger
1990/2008

BLANKAJ CIGNOJ




1. Fu - ĝas nor - den blan - kaj — ci - gnoj
2. Su - den bal - daŭ i - li — flu - gos
3. Ho fe - li - ĉa, ki - u po - vus,



an - taŭ bru - lo de so - me - ro;
 an - taŭ vin - tra fros - ta for - to;
 ĝus - ta - tem - pe for - flu - gan - te,




ĉar ĉe ĉi - om da — mal - bo - no
 ti - en re - en laŭ — se - zo - no
 kon - traŭ ĉi - o mal - a - gra - bla



sa - von — do - nas te - ro.
 pe - las — i - lin sor - to.
 gar - di sin, fu - ĝan - te!


M: Kozakoj de Kuban-rivero
 E (originale verkita): Albrecht Kronenberger
 1990



MORITATO DE LA VERDA ĈAPO

- ATENTU: Melodioj A kaj B aplikiĝas al malsamaj strofoj •

Melodio A:



1. Es - tis fo - je ĉa - po ver - da, la, la,
bo - na kna - bo, mul - te ler - ta, la, la,
di - li - gen - ta, la, la, nov - ler - nan - to, la, la,
de la lin - gvo Es - pe - ran - to, la, la.

Melodio B:



3. Por la svin - go kaj la lek'
de la fla - go U - nion Jack,
kun Oks - for - da to - no di - ras
la lu - peg': «Vi ki - en i - ras?»

MORITATO DE LA VERDA ĈAPO

▲ ATENTU: Strofoj A kaj B aplikiĝas al malsamaj melodioj ...

2. A

Dum li iras al la grupo la la,
renkontiĝas li kun lupo la la,
deĵoranto sub servuto
de la Brita Instituto.

4. A

«Al la kurs' konversacia la la
de la lingv' internacia la la
kaj neŭtrala kaj facila
por la tuta mond' utila!»

5. B

– tuj respondas ĉapuleto
kun en man' verda libreto
kaj ĝentile salutante
al la klub' ekiras lante.

6. A

Sed la lupo pli rapide la la
ĝin atingas kaj perfide la la
ruze trompas l' instruiston
kiu perdas la ekziston.

7. B

Formanĝita unuglute
de la lupo, kiu tute
tuj kamuflas sin simile
kaj atendas tre trankvile.

8. A

Tok! Tok! Venas Ĉapo frape la la
Kaj li haltas, mire, gape la la
«Kiel grandaj la okuloj!»
«Por kontrolo de l' reguloj!»

9. A

– diras Lupo sen ŝanceloj la la
«Kiel grandaj la oreloj la la!»
– Verda Ĉap' insisti provas.
«Tiel aŭdi bone povas

10. B

... mi pri kaz' akuzativa.»
Verda Ĉapo plu naiva:
«Kial estas buŝ' enorma,
kiel granda pordo forna?»

11. A

«Por vin manĝi ja pli bone, haha!»
Kaj la lupo senpardone la la
salte kaptas Verdán Ĉapon,
manĝas korpon, manĝas kapon,

12. B

... lin englutas dumminute
lin kruele voras tute,
ŝiras, maĉas lin kun krako
ĝis pleniĝo de l' stomako.

13. A

Kaj post tiu entrepreno la la
la lupeg' sen ia ĝeno la la
vivis longe dumjarcente,
tre feliĉe kaj kontente.

kanto de Gianfranco Molle
Italio
(laŭ popola melodio)
T: Vittorio Dalaqua

JEN DANKO MIA

Pro ĉi-u be-la vort'— al ni el ko-ro
Nur e-ta ĝoj', nur bru'— en vi-vo ni-a

vi-a, — pro ĉi-u el-ri-gard'— kaj rid' jen
es-tas, — kaj se a-pe-ras sun', — post


dan-ko mi-a. — nub' ĝi tuj for-es-tas. —

Kaj do-nis vi al kor'— da sun' a -
bun-don ti-an! — Mi po-vas di-ri

nur — el - ko-ran dan-kon mi-an. —

The musical score is written on seven staves. The first staff is in treble clef with a key signature of one sharp (F#) and a 4/4 time signature. The second staff has a first ending bracket. The third staff has a second ending bracket. The fourth staff begins with a double bar line and repeat dots. The fifth and sixth staves continue the melody. The seventh staff ends with a double bar line and repeat dots.

kroata polkanto
"Fala"
tradukinto ne konata



INTERNACIA FESTIVALO

www.internacia-festivalo.de

... jarfine al IF

27 decembro - 3 januaro

kun plilongiga ebleco ĝis 4 januaro

la tradicia jarfina oferto por familioj kaj plenkreskuloj

- kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso (30 dec)
 - kun alloga vespera oferto, kun silvestraj bufedo kaj balo
 - kun nia ŝatata kaj fama trinkejo »Knajpo«

**Ĉu vi disponas pri pliaj, allogaj kantoj ?
Bonvolu sendi al ni !**

Ni intencas eldoni novan kaj pli ampleksan broŝureton.
Dankon pro via kunlaboro!

Vizitu nin en Interreto
www.internacia-festivalo.de
pliaj informoj:
HDP@internacia-festivalo.de

INTERNACIA FESTIVALO

www.internacia-festivalo.de